

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報



Rozejoj jokohamaj

Rozo estis elektita kiel "la Floro de Jokohamo" en 1991. Kaj en la urbo estas pluraj rozo-ĝardenoj, ĉu kun enirkotizo, ĉu sen.

La fotoj montras kelke da rozoj en belvideja parko (sen kotizo), de kie oni povas rigardi la Havenon Jokohama, zorgita de la Urba Municipo. En la parko estas i.a. "Ĝardeno de anglaj rozoj", kie plantitaj estas rozoj devenantaj de Anglujo. Ili estas apud la t.n. "Angla Domo", iama rezidejo de brita konsulo en Jokohamo.

sezonvorto maja

Rozo 薔薇

Okita Kazumi

Rozo floras de majo ĝis junio. Jam en la *Manjoo-ŝuu* (la plej antikva poezia antologio 20-voluma) ĝi aperas sub la nomo "*umara*", kaj estas amata de japanoj ekde antikvaj tempoj.

Oni diras, ke ĝia aromo ne nur malstreĉas la korpon kaj menson, sed ankaŭ plibonigas la memoron. Onidire ankaŭ Kleopatra kaj la Romia imperiestro Nero amis ĝian aromon.

Korekto: la lastmonata titolo estu "sezonvorto aprila".



eĥo el Koreio

Busana "TERanidO" citis el ni

En Urbo Busano en Koreio, Busana Filio de Korea Esperanto-Asocio eldonas organon "TERanidO". Sur ĝi oni ofte mencias ricevon de nia organo. Lastatempe ili citis artikolon el nia organo.

TERanidO

Busana Filio de Korea Esperanto-Asocio


2026년
Marto(N-ro 351)

*창간/Fontita en la 4a, Julio 1981

*복간/Rekomencita en la 22a, Dec., 2007

*발간/Eldonita en la 30a, Marto, 2026

Komencas lerni Esperanton en Marto en Busano, 2026(foto:supre)



Komento al “La 138-a Legokunsido”

En la aprila n-ro ni aperigis eseojn de la legintoj de “Fabeloj kaj Eseoj de SUMII Sue”, tradukita kaj kompilita de Huzimaki Ken’iti. En tiu ĉi n-ro, ni publikigas lian respondan eseon.

El la tradukinto-kompilinto

Huzimaki Ken’iti

Tri el tiuj ĉi fabeloj: “La Rompita Arko”, La Reĝo Pimento” kaj “La Kalsono de Kapao”, aperis unue en romano “La Rivero sen Ponto” (*Haŝi no nai Kaŭa*) verkita de japana verkistino Sumii Sue (1902-1997). “Stela Festo” estis intermetita fabelo en libro por infanoj: “Elkrepuskiĝo, Mateniĝo” (*Joake Asaake*). La lasta, “La Spegulo, kiu Fariĝis Ĉielo” estis originale verkita en la formo de bildolibro en la jaro 1982. La ceteraj eseoj estis prenita el gazetoj kaj ĵurnaloj.

Kun sia edzo Inuta Ŝigeru, Sumii laboris per plumo por liberigi farmistojn kaj virinojn, kiuj suferis pro tiamaj malbonaj vivkondiĉoj ekonomia kaj socia. Ili aktivis en Tokio ĝis la jaro 1935. Pro intensa premo al ili fare de policoj civila kaj milita, ili transloĝis en la urbon (tiam ankoraŭ estis vilaĝo) Uŝiku, kie la gepatroj de Inuta havis domon kaj kampon. Anstataŭ malsanema edzo (pro severa astmo) Sumii plene tenis la familian ekonomion per sia plumo kaj per la laboro sur kampo. Antaŭ kaj post la fino de la Dua Mondomilito Sumii daŭrigis sian verkadon en pluraj plumnomoj. Post la forpaso de sia edzo en la jaro 1958 ŝi eklaboris por la ĉefverko “La Rivero sen Ponto”, kies lasta volumo, la sepa, eldoniĝis en la jaro 1992. La unuaj ses volumoj de la verko estis tradukitaj en lingvojn: angla, ĉina, tagaloga, kaj itala.

La ĉefverko traktis familion en vilaĝo, kie loĝis japanaj diskriminacioj nomataj “*buraku-min*”. Ĝi priskribis diversajn epizodojn

okazintajn ĉefe al la fratoj en la familio. Ŝi akuzis la diskriminacion, kiu estis longe heredata en la japana socio, kaj kiu ankoraŭ ne estas komplete nuligita. Tamen ŝi ne nur akuzis la diskriminacion mem, sed ankaŭ sugestis al ni la grundon, sur kiu diversaj diskriminacioj kreskas.

La homoj estas sociaj vivaĵoj. Kaj tial por formi kaj glate funkciigi la socion ni bezonas diversajn normojn, regulojn, leĝojn kaj fincan sistemon. Naskiĝis ankaŭ moroj, tabuoj, religioj, kaj diversaj konceptoj de nobleco kaj malnobleco. Ĉiuj tiuj estas “komunaj iluzioj” inter homoj. Sur la sistemo de iluzioj la homoj konstruis modernan civilizacion per ĉiam akumuliĝantaj scioj.

La iluzioj, kiuj devas servi al homoj, ne malofte katenas homojn inverse. Ili malpacigas, eĉ reciproke mortigas nin. Pensu, ke landolimoj, kiuj estas kompletaj iluzioj, konfliktigas eĉ sange najbarajn landojn.

Por ne esti trompita de la iluzioj, ni devas esti saĝaj. Klare ni konsciu; ke ni estas nur unu specio de la vivaĵoj sur la terglobo; ke nia vivo ne estas eterna; ke ĉiuj estas egalvaloraj antaŭ la paso de tempo; kaj ke ni ĉiuj estas nudaj kaj sennomaj kiam ni naskiĝas.

La tradukinto havis personan kontakton kun la verkistino, kiam li estis juna.

La konversacioj kun ŝi restas en lia memoro kiel valoraj trezoroj. En la rakonto “La spegulo kiu Fariĝis Ĉielo” aperis du nomoj: Serpen kaj Serpento. Ĉu la verkistino scipovis Esperanton? Ne. La fonto de la nomoj estas la tradukinto.

Eseoj

Digo de Miyagase

Antaŭnelonge televidaj novaĵoj raportis ke ĉi-vintre (2025-2026) mankas kvanto de akvo en multaj akvo-baraĵoj en Japanio. En la raporto mi vidis la pejzaĝon de la giganta digo de Miyagase, kiu troviĝas en montara areo de la rivero Nakatsu-gawa en la meza parto de Kanagawa-gubernio. La digo de Miyagase

AKIYA Hideo

naskis rezervujan lagon de Miyagase, kiu kapablas teni akvon je pli ol 180 milionojn da kubmetroj. Onidire, ĉi tiu digo estas unu el la plej grandaj en Kanto-regiono (t.e. Tokio kaj ĉirkaŭo).

Antaŭ ĉirkaŭ 10 jaroj, somere mi unuafoje vizitis ĝin por spekti planitan akvo-ellason el la digo,



foto 1



foto 2

kion oni okazigas ĉiu-ĵaŭde por ĝuigi turistojn. Du faskoj de amasega akvo elĵetataj el la fronta digomuro glitfalas sur la deklivo, batadas la fluejon, kaj disŝprucigas amason da akvogutoj. La torentoj tondras bruege kun forta aertremo. Tiu spektaklo vere impresis min.

Laŭ la raporto, tamen, nun en februaro la akvo malkreskis ĝis ĉirkaŭ 41% de la kapacito de la digo. Do, interese mi ekpensis ke mi iru tien por konstati la situacion de la akvorezervujo. Marde matene, la 10an de februaro, mi veturis tien per aŭto; la aliro bezonis ĉirkaŭ horon kaj duonon de mia hejmo.

Dank' al hela vetero, restaĵo de la semajnfina neĝo preskaŭ tute fordegelis escepte de la lasta parto de la aliro al parkumujo de la gubernia parko de Aikawa, najbara de la digo. Sur la vojo tie kaj tie en la ombro ankoraŭ kuŝis iom da dispremita neĝo kaj la vojo iĝis kruta deklivo. Do, mi sentis min iom streĉita kaj veturigis la aŭton malrapide. Fine sendanĝere mi atingis la parkon.

Dek kelkajn minutojn mi paŝis malsupren de la parko al la piedo de la digo. Tie staras vere granda

betonkonstruaĵo (foto 1), kiu baras V-forman valon de Nakatsu-gawa. Mi uzis lifton tra la digo ĝis ĝia supro (foto 2). Sur la supra koridoro restis iom da neĝo kaj oni ŝoveladis ĝin per buldozo. De tie bele videblas ĉirkaŭantaj montoj kaj fora montaro de Tanzawa.

Estis klare ke la akvokvanto aspektas ĉirkaŭ duono de tiu, kiun mi vidis 10 jarojn antaŭe. Surakve eksponita lagobordo estas kovrita kun neĝo (foto 3). Ĉe la okcidenta fino de la koridoro troviĝas eksponeja halo "Muzeo pri Akvo kaj Energio de Miyagase-digo". Tie mi trovis panelon, kiu montras la situacion pri rezervata kvanto de akvo tra jaro. La panelo diras ke ekde la lasta somero 2025 la kvanto rapide malmultiĝis kaj en la 5a de februaro ĉi-jare 2026 ĝi mezuriĝas je 41% de la maksimuma nivelo de akvorezervo. Tio okazis pro eksterordinare malsufiĉa pluvo de la lasta novembro ĝis nun.

La digo havas plurajn celojn; akvoreguligo por irigacio kaj kontraŭ inundoj, elektro-produktado, kaj ankaŭ kranakva provizado al multaj urboj en Kanagawa-gubernio inkluzive de nia Yokohama. Laŭ vikipedio, la provizado de kranakvo kovras 90%

de la loĝantoj en la gubernio. Do, la lago de Miyagase estas tre grava rezervujo. Mi esperas ke ĉi tiun akvofontan zonon pli malsekigu ĉi-vintra neĝado, kiu nun ĉagrenas loĝantojn de multe da neĝaj regionoj de Japanio.

Redakta noto: Laŭ la administrejo de Miyagase-digo, akvorezervo en la 12a de majo 2026 iom pliiĝis, kaj restas je 46 %.



foto 3

Kolektaj kartoj por akvobaraĵoj tra Japanio

Namba Fumiharu

Kiam vi rigardas grandan akvobaraĵon elpafantan amasan akvon, ĉu vi sentas intereson, scivolemon, kaj eĉ eksciton?

Tra la mondo ekzistas multaj hobiaj, kiuj temas pri diversaj aferoj, kolektindaĵoj, kaj eĉ publikaj instalaĵoj. Same kiel “fervojo-maniuloj” por fervojoj, ekzistas multaj “akvobaraĵo-maniuloj” por akvobaraĵoj. En Japanio ili estas konataj kiel *damumania* (ダムマニア) (angle?: Dam-Mania) en japanlingvo.

Por publika informado pri akvobaraĵoj, kaj verdire por doni amuzon al la hobiistoj, administracioj kiel la Ministerio pri Lando kaj Trafiko (国土交通省) kaj aliaj organizoj kiuj administras multajn akvobaraĵojn tra Japanio, eldonas kartojn *damukaado* (ダムカード) (Dam-Card) ekde 2007. La kartoj ŝajnas esti kiel ordinaj kolektaj kartoj (la grandeco ankaŭ estas same kiel “pokero-dimensia” ludkarto; 63mm × 88mm), kaj sur la karto oni metas foton de akvobaraĵo kun la nomo kaj aliaj informoj.

Oni povas ricevi la kartojn ĉe la administraj oficejoj de akvobaraĵoj (se ne ekzistas propra oficejo de la akvobaraĵo, la najbaraj muzeoj, urbodomoj ktp. traktas la eldonadon). La kartoj estas tute senpagaj, tamen, tiu kiu volas ricevi la karton devas reale viziti la akvobaraĵon. La eldonantoj neniam akceptas mendon sendi karton poŝte, kaj ili eldonas nur po unu karton por vizitanto. Tial la kolektado de akvobaraĵo-kartoj estas iom malfacila, kaj tial ĝi estas amuza hobiaj por la maniuloj.

Mia unua akiro de la karto estis en akvobaraĵo Miyagase (宮ヶ瀬ダム) [foto 1], la plej granda akvorezervujo en gubernio Kanagawa. Dum la lasta vintro tre malmulte pluvis kaj neĝis, ĵurnaloj raportis ke la rezervo de akvo malmultiĝis. Tial mi deziris rigardi la rezervujon, kaj mi vojaĝetis al Miyagase. Nu, tiam la akvo de akvobaraĵa lago restis nur malpli ol la duono, sed ankoraŭ ne estis elĉerpita (post tio, venis printempo kaj pluvos pli multfoje ol la vintro, la akvo de Miyagase iom plimultiĝas). Tiam mi gajnis la karton en observejo de la akvobaraĵo. Mi jam aŭdis pri la hobiaj de “Dam-Mania” kaj kolektado de akvobaraĵo-kartoj, sed tiam unuafoje sentis la


amuzecon.

Mi komencu novan hobion, jen kolektadon de la kartoj!

Je la unua semajnfino de aprilo, mi iris al Jacugatake Esperanto-Domo por komisiona kunveno pri ĉi-jara malfermo de la domo. Tiam antaŭ ol atingi al la Esperanto-Domo mi veturigis aŭton kaj vizitis najbarajn akvobaraĵojn. Bone, tri kartojn mi gajnis! La foto 2 montras la karton de akvobaraĵo Daimon.

Nun mi deziras akiri la karton de akvobaraĵo Minami-Aiki (南相木ダム), kiu situas 30 kilometrojn nordoriente de Jacugatake Esperanto-Domo. Tiu akvobaraĵo situas ĉe la plej alta loko tra ĉiuj akvobaraĵoj en Japanio. Pro multaj neĝoj, vojo al la akvobaraĵo estas fermita ĝis la mezo de aprilo (tial mi ne povis viziti je la unua semajnfino). Se mi havos tempon kiam Hama-Rondo okazigos kunloĝadon en Jacugatake, mi nepre vizitu al Minami-Aiki.

①



②

